*Aperis en: GrKG/H 45/1, marto 2004, p. 37*

**Protokoko de la 51a senatkunsido** (la 45a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, 54a post la fakta eklaboro) okazinta en Karlovo dum la bulgara prov-SUS la 17an kaj 20an de septembro 2003.

*1 Formalaĵoj*

Ĉeestis du senatanoj (la prezidanto, OProf. Dr. habil. H. Frank, kaj la direktoro de la ekzamenofico, OProf. H. D. Quednau) kaj parttempe kiel membro de la Granda Senato kaj unua revizoro la direktoro de la ekzamenofico kaj dekano de sekcio 6 OProf. Dr. G. Lobin. La senato ne estas kvoruma kaj povas fari nur neprokrasteblajn decidojn.

*2 Konsisto de la ekzamenofico*

Ĉeestas de la konstantaj membroj de la ekzamenofico nur OProf. Lobin. Apartenu por la bulgara provSUS kiel aldonaj membroj OProf. Frank por sekcio 1, OProf. Quednau por sekcio 5 kaj pro manko de efektiva membro de sekcio 2 ties adjunkto EProf. ADoc. Mag. sc. morph. Lewanderska-Quednau.

*3 Bulgaraj registro kaj filio*

La senato aprobas, ke la prezidanto subskribas (2002-09-20 kun la rektoro de la ŝtata Universitato Burgas, EProf. Nikolay Ralev ISK dr., kaj kun la rektoro de la (neŝtata) Internacia Universitato Karlovo (IUK) / Klerigejo de AIS kaj estro de AIS Bulgario, EProf. ADoc. Boĵidar Leonov cand. sc., kunlaborkontrakton, laŭ kiu la bulgara registro estos malfermita kaj konservata en ambaŭ universitatoj, tiel ebligante la oficialigon de la bulgara filio de AIS kun la gvida triopo EProf. Leonov, EProf. Ralev kaj (pro nomumo fare de la senato de AIS) la vicrektorino de IUK, EProf. ADoc. Lewanderska-Quednau.

*4 AIS Pollando*

Pro la limdato kaj aliaj kondiĉoj starigitaj de la Asembleo de la Subtena Sektoro dum SUS 26 por la transpreno de la ŝuldoj de AIS Pollando, la senato subtenas la proponon de la polaj AISanoj partoprenantaj en la bulgara prov-SUS, ke AProf. Witold Stępniewski, vicrektoro de la Teknika Universitato de Lublin, fariĝu kroma estrarano de AIS Pollando kaj zorgu pri la plenumo ankaŭ de la aliaj kondiĉoj por renormaligi la funkciadon de tiu landa asocio de AIS.

*5 BUS 5*

La senato deziras la okazigon de BUS 5 2004 en Pollando kunlabore laŭeble kun la Teknika Universitato de Lublin kaj ĉiukaze kun AIS Pollando, ambaŭ reprezentotaj fare de AProf. Stępniewski.

*6 Plenumo de alvokodecidoj*

La senato petas la prezidanton, plenumi la alvokon de kolego Stępniewski kiel efektiva membro (AProf) kun dokumento-dato 2003-09-17.

*7 Konservado de la disertacioj*

La senato rekomendas kaj aprobas, ke la disertaĵoj de la sukcesintaj kandidatoj de la bulgara prov-SUS restu en IUK kaj estu tie laŭeble komplete konservataj kaj dokumentataj.

*8 Finkalkulo*

La senato komisias al la deĵorantaj direktoroj de la klerigofico kaj de la ekzamenofico kune kun la direktoro de IUK fari senprokraste la finkalkulon pri la bulgara prov-SUS kaj havigi ĝin al la trezoristo de AIS. Por plisimpligi la finkalkulon IUK ne prezentu unuopajn fakturojn sed ricevu la netan gajnon kiel subvencion.

*9 Aliaĵoj*

Ne estas pritraktenda io alia.

Karlovo, 2003-09-20 Protokolis: H. Frank